GISTO, JUL,2010.
Strato Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00.

.....

DANĜERO

Posedandoj de UNICODE en sia komputilo, estu singardaj. Mi malkovris kie kaŝas sin la damninda koboldo kiu elviŝas la tuton kion vi skribis kaj ankaŭ tion kiu jam estis savita!!...Tiel denove okazis al mi kaj mi perdis duonpaĝan tekston. Oni preskaŭ freneziĝas. Mi tuj decidis malkovri kiujn klavojn oni devas ne samtempe tuŝi.se oni volas ne perdi la pretan tekston. Post kiam mi pretigis etan testan tekston, mi tenis premita la klavon CTRL, kiu ebligas skribi la diakritajn E-literojn kaj komencis laŭvice premi la literan klavaron. Mi komencis live per la infra linio, z, x... – Nur kiam mi premis la **literon-o** la testataj vortoj fulmrapide malaperis. Jen do la kaptilo !

Okazas ke kiam mi devas skribi majusklan literon-o kaj erare premas la klavon kiu situas tuj sub la klavo por majuskligi, la fuŝo okazas. Kaj nun, Jozefo ? – Kion entreprenu homo kiu ne plu scias tajpi per la du manoj samtempe, por ke tia mistajpo ne plu okazu ? « Ne oldiĝu , ĉu ?" Sed, validas demandi ĉu iu rekomendas alian solvon, eble la «Ŝapelilon ». Kiu bonvolas helpi min ?

TURISTEMA ARNO

Lastan semajnfinon mi povis sperti refojan per Skajpan QSO kun nia amiko Arno, post lia reveno el Usono kaj li apenaŭ atingis varmigi sian hejman neston. Li jam plue turistas, Cifoje al KampoGrande-MS. Li asertas ke, dum restas groŝo en poŝo li vizitas ĉiujn Esp-eventojn. Bone li faras, dikigante la gaŭĉan grupon da kongresantoj per flue parolantaj homoj. Lenio, estu singarda, vi eble baldaŭ perdos vian renomon!

SANGAMA HOMARO

Diveneblas, ke la mondo nur malboniĝas. Sango aĉe makulas la manojn kaj la korojn kaj la menson de la homoj.

HOLANDA MALBENO

Far D.Koimbra.

Estis de mi sciate ke estos ne eble venki la holandan teamon en la KabUrbo. Mi sciis ke en tiu loko ili estas nevenkeblaj. En Kabo Bonaespero la holandanoj kalkulas je io pli potencan ol akuratan futbalon kaj malmokan fajfadon. Ili kalkulas pri transmonda helpo.

Ekzistas holanda fantomo kiu de 300 jaroj gardas la Bonaespero-Kabon. Ĝi estas la spirito de Hendrik Van der Deken, nomata "Fluganta Holandano".

Tiu Van der Deken estis konata kiel malbonkaraktera sed bonega ŝipa komandanto. En 1860 li veturadis cele komercadi kun la Orienent-Hindiaj Landoj. Alveninta en la regionon kie pasintan mardon okazis la trista elimino de la urugvaja teamo, proksimiĝis fortega topika tempesto. Tial ke li estis maristo fiera pri sia lerteco, li konsideris grava ofendo se li ne sukcesus preternavigi la Kabon.

Malgraŭ petegoj de lia maristaro, ke li resignu pri la entrepreno, li insiste alpruis la potencajn tormentajn ekpuŝojn venantajn el sudoriento. La tormento ĉifonis la velojn, detruis la rudron sed Van der Deken, kvazaŭ Robben, ne rezignis. La ŝipo de la maro skuata de unu flanko alian, sen progresi, kreskigis la koleron de la komandanto.

Laŭ legendo, Lucifero persone, kun siaj hufoj kaj kornoj, aperis en sonĝo al Van de Deke kaj eluzis lian

momentan fragilecon por sugesti ke li spitu la Ĉiopovan, kiu malhelpis lin preterveturi la Kabon. La komandanto vekiĝis kaj konsideris la fiideon tre bona. Salte kaj rabia supreniris al la ferdeko kaj alfrontis la Sinjoron per vortoj jene priskribitaj laŭ la maristoj :

« Freneza li voĉigis la teruran blasfemon kaj kriis pli laŭte ol la tempesto : Mi spitas ke la Dia Potenco modifu la irvojon de mia celo de mia kariero. Eĉ ne la diablo del'Infero igos min timi eĉ se mi devos navigi ĝis la Tago de la Lasta Juĝo"

Ŝajne la spito ne plaĉis al Dio . Li sendis anĝelon al Kabo Bonaespero kaj ĉi ĉiela funkciulo, per tondra voĉo diris ke Van der Deken vagados tra tiuj maroj ĝis la dia trumpeto tondros en la Ĉielo ».

De tiam la dia trumpeto, laŭ sciate, neniam tondris. Pro tio restis al la malfeliĉa komandanto estigi fantomajn aperadojn en sia ŝipo sur la maro apud la Kabo. Jam vidis ĝin dekoj da banistoj kaj eĉ Ĝeorĝe V, la angluja reĝo. Sciencistoj registris la rakontojn kaj spekulacias ke la fantomoj estas nur miraĝoj kvankam la detaloj menciitaj de la atestantoj tree similas inter si kaj tio impresas la interesatojn.

Riĥard Wagner verkis operon en kiu li rakontas la epizodoj de Van der Deken kaj ĝuste nomis ĝin "Fluganta Holandano". Jen, kio celebrigis Van der Deken. Sed, multe pli frue la maroj ĉirkaŭ la Kabo famis kiel malbenitaj. Kamoes menciis ĝin en La Luzidoj, en tempo kiam la fantomejo estis konata kiel Kabo del'Tempestoj:

"Estas mi la granda kaŝita Kabo, kiun vi nomas Tempestejo, kiun neniam preterpasis Ptolomeu, Pomponjo, Estrabo, Plinio kaj al kiome preterpasis, mi estis notinda. Ĉi tie mi finas la tutan afrikan marbordon en ĉi mia neniam ekvidita promontoro kiu al la Antartika Poluso etendiĝas al kiu via riskemo tre ofendas".

Mal benita Kabo, do. Kabo ĉe kiu nur samlandanoj de la Fluganta Holandano povas kalkuli pri bonŝancoj. Restu al ili, same kiel al Van der Deken, erarvagadi sen konkeri unu solan pokalon ĝis la fino de ĉiuj pokaloj.

PARDONPETO

Ĉiu leganto sciu, ke mi preskaŭ freneziĝas pro la konstato ke neniu ĝisfunde kaj daŭre subtenas erojn ekstreme necesajn por ke nia afero prosperu. Ekz.: de longaj jaroj Gisto proponis ke ni havu minuton aŭ du dum la VKafo dum kiu unu el ni laŭtlegu paĝon da teksto aŭ recitu etan versaron kun la celo aŭdigi bone prononcatan Esperanton al homoj kiuj ĉirkaŭas nin en la restoracio.

Bv ideti :

AŬTOMOBILO

Pastoro havas filon studenton kiu petas aŭton al sia paĉjo. La patro promesas pristudi la eblecon donaci lian unuan veturilon kondiĉe ke la junulo pritondu sian hararon. Forpasas monato, forpasas du, la filo iom malpacience ripetas sian deziron, posedi aŭton, pretekstas ke li diligente studis, montras la notojn de la lernobjektoj. Paĉjo ne montras inklinon tuj cedi kaj rebatas: sed vi ne kurtigis siajn harojn. La longhara fraŭlo atakas per forta argumento: nu bone, sed Jesuo kaj la profetoj havis longan hararon.
Paĉjo: sed ili iradis piede

IMPERTINENTECO

Je la dua frumatene drinkemulo komencis veki la loĝantojn de serio da apartamentoj kaj, je ina respondoj la ulo demandadis, ĉu via edzo estas hejme? – Certe jes kaj per interfono lin forpelis... drikemulaĉo! Iru for! Li daŭrigis sian serĉadon, ĉu via edzo hejmas? – Jes ja, tutcerte kaj la ulo sekvis la ĝenadon al inoj tra la tuta konstruaĵo ĝis ina voĉo furioze diris NEeee!!... – Do vi povas descendi, veni kaj kontroli, ĉu estas mi ?